

Kultura Centro Esperantista eniras novan labor-fazon
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 559, 1974.06.26 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nuntempe Kultura Centro Esperantista dissendas nacilingvajn informilojn por vastskale informadi pri la efektivigita laboro kaj pri dikonindaj projektoj. Ni profitas tiun okazon por raporti pri la aktiveco de tiu centro.

A.- Kultura Centro Esperantista eniras novan labor-fazon. Dank'al subvenciado de la urbo La Chaux-de-Fonds ĝi ekde nun disponas je loĝejo, kie estos starigita konstanta sekretario, kaj baldaŭ je alia loĝejo, kiu fariĝos gastigejo por nesalajrataj kunlaborantoj, kiuj estas pretaj doni kelkajn semajnojn aŭ monatojn por helpi al la rutina laboro kaj al precizaj taskoj. Tiuj kunlaborantoj ricevos ĉiusemajne monsumon, kiu garantios la vivtenadon.

Cl.- Kultura Centro Esperantista estis fondita en 1968 en la celo diskonigi Esperanton, ĝin enkonduki en la lernejojn kaj en la kulturajn mediojn, akceli la disvolviĝon de moderna didaktiko bazita sur programita kaj aŭdvida lingvo-instruado, eldoni kursojn, organizi seminariojn por la formado de esperanto-instruistoj kaj fine apogi ĉion, kio kontribuas al la kresko de la kultura vivo de la esperantistaro kaj al diskonigo de tiu aktiveco en la eksteran publikon.

A.- Por la plenumado de tiuj taskoj Kultura Centro Esperantista kalkulis ĝis nun je la nura malavareco de la esperantistaro kaj de ties amikaro. La donacoj registritaj en 1973 atingis la ĝojigan sumon de pli ol deksep mil svisaj frankoj. Ĉiuj monkontribuintoj ricevadas informilon, kies titolo tute simple estas *Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista*. Kiu kontribuas per donaco de almenaŭ sesdek svisaj frankoj en la jaro, tiu ricevas la titolon de Apoganto por la koncerna jaro. En 1973 estis listigitaj 93 tiaj Apogantoj. La aliaj kontribuantoj estas konsiderataj kiel Observantoj.

Cl.- En 1974 Kultura Centro Esperantista eniris sian sesan vivjaron. Jen bilanco de la jam efektivigita laboro. Ni unue diru, ke Kultura Centro Esperantista difinis sian celadon en laborprogramo, kiu estis akceptita okaze de Ĝenerala Kunveno en 1973 kaj kiu koncernas trijaran periodon. Tiu dokumento, kiu listigas per tre preciza formulado diversajn agadojn, donis al KCE firman kunlaborfundamenton. Oni ne rediskutas tiun programon, sed ĉiuj, kiuj transprenis bone difinitan taskon, provas ĝin plej rapide igi realecon. Pli ol 40 personoj akceptis respondecon. Tio favore impresas kaj la esperantistaron kaj la eksteran publikon.

A.- Inter la fundamentaj agadoj jam realiĝis la eldonado de informfolioj kaj dokumentujoj pri la nuna disvolviĝo de esperanto, tio en la lingvoj franca, germana kaj itala. Aŭdvida inform-materialo helpas por prezenti esperanton en ekspozicioj kaj kunvenoj. Minimume po unu fojon en la jaro nacilingvaj inform-bultenoj estas dissendataj al la deputitoj de la parlamentoj de kvin kantonoj: Bazelo-urbo, Berno, Ĝenevo, Neŭŝatelo kaj Tiĉino. Iliaj titoloj estas: *L'Essor de l'espéranto*, *Esperanto-Forum* kaj *Lo Sviluppo dell'Esperanto*. Gazetara servo rikoltas kaj registras plej multe da aperintaj gazet-artikoloj. Poste tiuj artikoloj estas konservataj en la Esperanto-arkivejo de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Estas nun starigata banko da artikoloj.

Cl.- Ekde 1970 funkcias bone provizita libroservo. Tiucele KCE devis investi sufiĉe gravan monsumon. La inventario de la librostoko je la 31-a de decembro 1973 indikis por tiu investo

sumon de svisaj frankoj dudektri mil. Tuj kiam la ŝuldo de tiu servo estos malaperinta - fine de 1973 restis ankoraŭ pagotaj iom pli ol trimil frankoj – la profito de la vendoj servos al la muntado kaj funkciigo de migranta ekspozicio, kiu estos prezentata en la montrofenestroj de la librovendejoj kaj en la koridoroj de la duagrada kaj superaj lernejoj. Aŭtomata projekciado vigligos tiun prezentadon.

A.- Por helpi la novajn esperantistojn kaj eviti al ili resti eternaj komencantoj, Kultura Centro Esperantista kreis korektadajn servojn por franc-, german- kaj ital-lingvanoj. En ĉiu lernolibro, vortaro kaj legolibro, kiun vendas la libro-servo de KCE, informileto donas la adresojn de tiuj korektadaj servoj. Ĉiu povas tiel kontroligi siajn lingvajn ekzercojn, unuajn leterojn kaj eĉ paroladojn, tradukojn kaj ĉiaspecajn verkojn.

Cl.- Por la esperanto-instruantoj kaj instruistoj Kultura Centro Esperantista organizis pedagogiajn seminariojn en Bazelo, Soloturno, Renens apud Lausanne, Mont-Soleil kaj Moutier en Berna Ĵuraso. Temis pri enkondukaj kursoj al la lernado de Esperanto, pri enkondukaj kursoj al la programita, aŭd-vida kaj perskeĉa instruado. Paralele al tiuj seminarioj la koncerna instrumaterialo estis verkita, eldonita kaj eksperimentita. Nun tiel ekzistas enkonduka aŭdvida kaj programita esperanto-kurso por franclingvanoj kaj itallingvanoj, aŭdvida kurso bazita sur la lernolibro *Junul-kurso de SAT*, programitaj skeĉoj kaj koresponda programita kurso, kies 13 unuaj ĉapitroj estas nun en eksperimentado fare de pli ol 400 gelernantoj en Belgio, Francio, Germanio okcidenta kaj Svislando.

A.- La venontan semajnon ni raportos pri aliaj realigaĵoj de Kultura Centro Esperantista kaj pri la Internacia Feria Altlernejo, kiun ĝi ekstarigas.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!